Prague

BIBLIOTHÈQUE LI BUL LA CHAUX-DE-FONDS

# bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
ĈE KULTURCENTRO DE ONV 1

N-ro 56

Aŭgusto – septembro 1960

MARIE MAJEROVÁ

## PRAHA

La mezepoko ne revis pri la hodiaŭaj milionopaj urboj nek la iamaj prahanoj pripensis, ke estonte en iliaj stratetoj svarmos tiom da veturiloj. Ili ja konstruadis nur por sia dumtaga negocado. Nokte la gardisto per halebardo haltigis ĉiun, kiu ŝteliris sen lanterno. Tiamaj patricioj pensis nur pri propra sekureco kaj malmulte da spaco estis inter la urbaj muregoj.

Ni heredis tion, kion dum epokoj la arkitektoj-artistoj kaj ŝtonhakistoj enkorpigis en ŝtonblokojn. Per la prilaboritaj granito aŭ sabloŝtono ĉiu epoko eternigis sian atmosferon, sian poezion kaj belsenton. Kaj ni hodiaŭ ŝatas tiun ĉi perfekte vivan kompilaĵon da stiloj, kiuj kvazaŭ ludkreis sinsekvaj epokoj. Plaĉas al ni la pitoreskaj portaloj kun ursetoj, pesiloj kaj rozoj. Plezure ni rigardas angulojn kun herberoj sur flankesituita pavimo. Ravas nin foliaro de balkonaj balustradoj el fero batformitaj. Ni amas la refrakton de ombro kaj de malluмо en seneliraj stratetoj, kie la luno malkaŝiĝas kisantajn amantojn.

Sed al malnova Praha – belulino ni estas logataj ankaŭ per imagipovo de fantazio, saturita de la historio. Super la arkado de ŝtona ponto ni kutimas revi pri sangverŝaj batalrenkontoj pro kredokonfeso de la ekkonita vero. Tra gracilaj fenestroj de la Betlehem-kapelo revigliĝas nia memoro per la voĉo de magistro Jan Hus. Montopinto Vítkov vivigas en ni gloron de husanaj armeoj. La Malnovurba placo! Kiu povas hodiaŭ trairi ĝin sen ŝokanta teruro de fantomoj: ĉi tie tumultiĝis ribelanta malriĉularo, ĉi tie ruĝe sangis la ekzekutejoj de noblaj civitanoj. Kaj la Pulva turo povus nomiĝi la Paca memore al paciga penado de ĉeĥa reĝo Georgo el Poděbrady. El araneaĵo de stratetoj superflugas nia ravita rigardo al la turpintoj, are amasigitaj finialoj, kupoloj kaj kupoletoj, portantaj la firmamenton apenaŭ supozantan en ambaŭflanka frontonombro de altaj domoj.

Sed hodiaŭ ja ekzistas, ekzakte dirite, du Praha – urboj: la riĉornama Malnova, la koro de Praha, kaj la nova Granda Praha.

La Nova Praha antaŭ niaj okuloj kreskas el betonaj fundamentoj, el brikmuroj, kaj la novigemaj konstruistoj rapidigas ĝian kreskon senĉese per pli bonaj metodoj. La oferemaj manoj de bonvolontuloj rearanĝas la lokojn neglektitajn dum Hitler-invado. La lertaj manoj de ĝardenistoj senvivajn vojkruciĝojn ŝanĝigas en agrablajn parkojn. Tiel en ĉarmeco disvolviĝas la ebenaĵo de Letná, kiu aerumas la urbon kaj malvualas la firmamenton en ĝia giganta vuivaĵo kun sunmigrado tage kaj kun stelaro nokte.

La Nova Praha! Kian aspekton ĝi montros al niaj posteuloj? La socialistoj antaŭvidante pluajn milionojn da posteuloj grandspace mezuras estontajn stratojn de Praha. Novaj placoj vasten malfermas brakojn al homamasoj. La ĝardenoj de malnovaj palacoj, dum jarcentoj ŝlosfermitaj, hodiaŭ alireblIĝas por infanoj. La prahano ricevis vastampleksan parkon de kulturo kaj ripozo zorganta pri kontentigo de

/Daŭrigo sur la kvara paĝo/